Numero kvina. Ĵaŭdon 11-an de aŭgusto

Kongresa Sciulo

Kongresa Kuriero de la 107-a Universala Kongreso de Esperanto

# La Reĝa Monto, la natura monumento de Montrealo

Vi ne povas maltrafi la monton — videbla de pluraj lokoj en la urbo, ĝi estas grava kaj rekonebla simbolo de la urbo. Vizitu ĝin sole aŭ kun aliaj esperantistoj! Ĝi situas ĉ. 3 km piede de la kongresejo. Klaku ĉi tie por vidi la itineron piede. Iru laŭ la strato Sainte-Catherine okcidenten (al la direkto de la teatro Impérial kaj Place des Arts). Turniĝu dekstren sur la strato Peel kaj iru laŭ ĝi ĝis la monto. Se vi prenas la metroon, iru ĝis la metrostacio Peel, kaj marŝu laŭ la strato Peel ĝis la monto. Vi vidos la ŝtupojn, kiuj gvidos vin al konstruaĵo kun la vido sur la monton. Tie troviĝas ĉaledo Mont-Royal, kiu havas senpagajn necesejojn kaj etan kafejon. Notu ankaŭ belajn pentraĵojn en la ĉaledo. Tuj apud troviĝas elrigardejo *Belvédère Kondiaronk* kun belega vido al la urbo. Faru multajn fotojn!

Promenu laŭ multajn padojn de la monto. Tie vi vidos ankaŭ multajn sciurojn kiuj tute ne timas homojn. Oni rekomendas ne nutri la sciurojn.

**Jen iom da historio**

En 1535, Jacques Cartier supreniris la monton gvidata de indiĝenoj kaj notis: «Jen monto je kiu oni havas foran vidon, ni nomis ĝin la Reĝa Monto ». 20 jarojn poste, geografo Giovanni Battista desegnis mapon laŭ la indikoj de Cartier kaj indikis Monte Real laŭ la itala. Kunigitaj la vortoj estas Monreale kaj la antaŭa nomo Ville-Marie donita de la fondinto de la urbo, Maisonneuve en 1642 estis ŝanĝita al Montrealo en 1763.

Sed kio estas la deveno de la monto. Nu, antaŭ 570 millionoj da jaroj, tropika maro kovras la regionon dum 300 millionoj da jaroj. Sed antaŭ 125 milionoj da jaroj, vulkano formiĝis sub la maro kaj la lafo kreis submarajn montojn. Dum la lasta glacia epoko antaŭ 20 mil jaroj (estis 4 glaciaj epokoj) la montreala regiono estis kovrita per glacitavolo de 2 km. Fine antaŭ 12 mil jaroj, la ebenaĵoj leviĝis ĉar ne plu estis pezego de la glacio kaj la reĝa monto fariĝis insulo.

Iom post iom la plantoj komencis kreski kaj 3 mil jaroj



poste la pejzaĝo estis tute alia kun abioj, betuloj kaj pinoj. Estas antaŭ 5 mil jaroj ke la arbaroj atingis maturecon kun aceroj, kverkoj, fagoj. Nun 150 specioj da birdoj, 20 specioj da bestoj kiel sciuroj kaj marmotoj, mefito kaj prociono, 65 specioj da arboj kaj 600 specioj da plantoj vivas sur la monto.

**Kio pri la unuaj loĝantoj ?**

Pli ol mil jaroj antaŭ la alveno de blankuloj, indiĝenoj venis al la monto por trovi utilajn ŝtonojn, tiel estas ŝtonoj por fari ilojn, sagojn, tranĉilojn. Hochelaga estis unu el la plej grandaj vilaĝoj de Irokizio. Indiĝenoj uzis la lignon por konstrui longajn domojn kaj kultivis la grundon por produkti tabakon sed ankaŭ la tiel nomatajn tri fratinojn : kukurbon, maizon kaj fabojn. Je la alveno

# Venontjare en Torino!

LKK Torino atendas vin kun informoj, klarigoj, donacetoj kaj t-ĉemizoj. Venu subteni nian ontjaran kongreson. Giĉeto apud la akceptejo.




Krome: ekde hodiaŭ eblas jam aliĝi ankaŭ rete! Bv. iri al: **https://uk.esperanto.net/2023** - kaj plenigu la retan aliĝilon! Eblas ankaŭ rekte pagi diversmaniere, elektu laŭplaĉe.

**Germanio kore salutas la Universalan Kongreson en Kanado.** Ni deziras bonan sukceson kaj konstrueman laborplanadon por la estonteco. UK-partoprenantoj kompreneble bonvenas en la Esperanto-Centro de la unika oficiala Esperanto-urbo, Herzberg am Harz. Ni ofertadas la plej larĝskalan Esperanto-servoprogramon.
Kore kaj samideane salutas je nomo de nia EGS-estraro: Peter Zilvar, Zsófia Kóródy, Harald Mantz.
Same kore bondeziras la urba administracio, urba konsilantaro kaj la ĉefo de Herzberg am Harz – la Esperanto-urbo, nome nia urbestro, sinjoro Christopher Wagner.

**Reĝa monto…**

de Jacques Cartier, 1500 Irokizoj vivas en Hochelaga en 50-o da longaj domoj.

Jaro post fondiĝo de Ville-Marie fare de Maisonneuve, li metis krucon sur ĝi.

Dum la 17a jarcento, koloniantoj pli kaj pli instaliĝos ĉirkaŭ ĝi kaj starigos farmbienojn.

Meze de la 19a jarcento, riĉaj industriistoj kaj komercistoj aĉetos terenojn por siaj luksaj domegoj kaj la fruktejoj malaperos. Oni konsideras ke 70 % de la kanadaj riĉecoj troviĝis tiam en la manoj de tiuj kiuj loĝis apud la monto en la tiel nomata Golden Square Mile.

*Kongresa Sciulo* estas la kongresa kuriero de la 107-a Universala Kongreso de Esperanto, en Montrealo, Kebekio, Kanado, de la 6-a ĝis la 13-a de aŭgusto de 2022. Redaktas Sylvain Auclair. Redaktejo: ĉambro Milojević, Université du Québec à Montréal, DS-R340. Nova numero aperas ĉiumatene (krom en merkredo). Eblas elŝuti koloran version per apo trovebla je uk2022.glideapp.io. Kontribuojn (tekstojn kaj fotojn) sendu al jrsylvain.auclair (ĉe) gmail.com.

© Universala Esperanto-Asocio, 2022.

Dépots légaux: Bibliothèque nationale du Québec et Biblothèque nationale du Canada, troisième trimestre, 2022.

**Spuroj de Frederick Law Olmsted (1822-1903)**

Li estas taksata kiel la patro de pejzaĝa arkitekturo en Norda Ameriko. En 1857, kiam li estis 35-jara, li respondecis pri la kreado de la Centra Parko en Novjorko. Kun siaj filoj li starigis kompanion pri parko-planado kaj oni konsideras ke ili kune prilaboris pli ol 5000 projektojn en 44 usonaj ŝtatoj kaj en Kanado. Oni konsideras ke la parko de la reĝa monto estas inter siaj plej belaj atingoj.

Ekde 1987 oni konsideras la parkon kiel naturan historian heredaĵon kaj ĝi estas severe protektita.

**Kastora Lago**

Dum la 30-aj jaroj estis granda ekonomia krizo kaj multaj personoj estis senlaboraj. Do, la kebekia registaro donis monon por tiel nomata *travaux de chômage,* laboro por senlaboruloj. Tiel 160 laboristoj mane fosis la lagon. Farante tion ili malkovris malnovajn trunkojn faligitajn de kastoroj, tial la lago nomiĝas nun Kastora Lago. Antaŭ kelkaj jaroj oni multe renovigis la Kastoran Lagon kaj la terenon ĉirkaŭ ĝi.

**La domo Smith**


Hosea B. Smith, komercisto kaj domvendisto, konstruiigos domon en 1858. Tiu ĉi vilao kun ĉevalejoj kaj vastaj ĝardenoj estas tre impona pro ĝia situo. En 1872. la urbo Montrealo aĉetas ĝin je 110 000 $ (multe pli ol 10 milionoj nuntempe). Ĝis 1940, loĝas en ĝi la parkestroj; poste ĝi fariĝas policejo ĝis 1962. Poste arta centro de 1963-83, oni uzos ĝin kiel muzeo pri ĉasado ĝis 1989. Ekde 1998, ĝi estas sidejo de la Amikoj de la Monto, fondaĵo kiu okupiĝas pri la monto, muzeeto kaj kafejo.

La elrigardejo datiĝas de 1906 — granda ŝanco ke Zamenhof vizitis ĝin en 1910, kiam li vizitis la urbon. La ĉaledo nuntempa datiĝas de 1937, konstruita per senlaborula laboro denove kiel por la lago. La placo estis renovigita en 1992.

En la parko vi trovos plurajn skulptaĵojn. Ili ĉiuj estas de la Internacia Skulptista Simpozio de 1964. 12 artistoj el 9 landoj partoprenis. Notu ankaŭ ke ekde 1970, la oficejaj turoj ne povas pli alti ol 235 metroj por ne superi la alton de la monto.

# Letero de Judit Benczik

Mi estas Judit Benczik, la pli aĝa filino de Vilmos Benczik. Mi ĵus ricevis de mia onklo, Gavriel Zeevi, la planon de la kongresejo de la ĉi-jara kongreso, kie unu el la ejoj portas la nomon de mia patro. Mi ŝatus danki en la nomo de mia patro pro la penso kaj la gesto. Dum sia tuta vivo, mia patro studis kaj laboris pri la lingvo Esperanto kun granda amo — mi nur komprenis kaj perceptis tion, ĉar mi mem ne parolas la lingvon. Mi estas tre feliĉa ankaŭ pro tio, ke la ejoj sub la nomo de mia patro kaj de Simo estas proksimaj unu al la alia, ĉar ili estis bonaj amikoj. Mi estis kortuŝita pro la atento donita al mia Paĉjo tiamaniere, kaj mi scias, ke li alte valorus ĝin. Mi ŝatus, ke ĉiuj partoprenantoj en la evento sciu tion. Tial mi petis mian onklon helpi min traduki tiun ĉi leteron, kaj mi aprezus, se ĉi tiu dankletero mia estus plusendita al ĉiuj, kiuj dum siaj taskoj en al la organizado de la kongreso helpis enŝteli la spiritan ĉeeston de mia patro en la programon de la ĉi-jara kongreso kun tiu ĉi afabla gesto: marki salonon per lia nomo. Tio, kion donis al li la Esperanto-komunumo, estis tre grava por mia patro, kaj mi sentas, ke per tiu ĉi nomelekto la komunumo nun montras al li, ke lia memoro ankoraŭ konserviĝas. Koran dankon pro ĉio ĉi, kaj mi deziras al vi multan sukceson en la ĉi-jara kongreso



Vilmos Benczik

# Anoncetoj

**Mapoj de kongresejo**

Mapoj de kongresejo troviĝas je paĝoj 9 kaj 10 en la kongresa libro. Bonvolu konsulti ilin antaŭ veni al la informejo. Nur se vi vere ne orientiĝas, venu al la informejo. Dankas vian bonvolon

**Kongresa butiko**

Pluraj varoj elĉerpiĝas sed restas ankorau multaj. Aparte aceraj bombonoj estas bela donaco por doni al viaj familianoj, amikoj post via reveno hejme. Saketo kontrau 3$ au 3 saketoj kontrau 7$.

# Montrealaj adresoj kaj ĉefdirektoj

La montreala adressistemo estas malsama de tiu, kiun oni ĝenerale uzas en Eŭropaj landoj. Ĝi funkcias kiel duona kartezia plano, kies originpunkto estas ĉe la riverega komenciĝo de la *bulvardo* Saint-Laurent (bulvardo nur laŭ la nomo). De tie numeroj kreskas norden, orienten kaj okcidenten. Tial, por adresoj ĉe iuj stratoj, kiel la strato Sainte-Catherine, oni devas aldoni Est (oriente) aŭ Ouest (okcidente). La kongresejo estas en la orienta duono de la urbo, proksime al la dividlinio, kio estas la bulvardo Saint-Laurent. Krome, strato ne bezonas komenciĝi je nulo por obei tiun sistemon: je la sama distanco de la riverego aŭ de la bulvardo Saint-Laurent, adresoj estos similaj. Mi kiel infano kreskis sur strato, kies numeroj komenciĝis je pli ol 9700… Kaj neortaj stratoj, kiel strato Sherbrooke, pliĥaosigas la sistemon kaj kaŭzas subitan salton kaj malaperigon de miloj da adresoj… Nu, nek la bordoj nek la monto estas ortaj…

Nu, mi parolis pri nordo, oriento kaj okcidento. Tiel montrealanoj parolas, sed ili mensogas. France, *perdi la nordon* signifas *perdiĝi, ne plu scii kion oni diras aŭ faras*. Nu, Montrealo perdis la nordon. Kion ni nomas nordo fakte estas nord-okcidento. Kaj simile por okcidento (sud-okcidento) kaj oriento (nord-oriento). Tio veras por la kvartalo, kie situas la kongresejo; en aliaj la diferenco inter la montreala *nordo* kaj la kompasa nordo povas esti eĉ pli granda. Kie mi loĝas, ĝi estas pli ol 90°!




Tiun sistemon Montrealo enkondukis antaŭ jarcento, post kelkaj jardekoj da amasa aneksigo de najbaraj vilaĝoj kaj urbetoj. Sed restis pluraj urboj ekster tiu sistemo; pluraj el ili aneksiĝis en 2001, sed tiuj konservis ĝis nun siajn proprajn adressistemojn, kiam ili havis iun. Atentu ne perdiĝi, sed neniam fidu la sunon por retroviĝi!

\Sylvain Auclair


# Reaperis libroforme la lernu-rakonto

Dum tiu ĉi kongreso reaperis la reeldono de la sukcesa verko *La teorio Nakamura* de la fama E-verkistino Anna Lowenstein. La libro estas fakte bazo de la nuna Esperanto-kurso de la fama senpaga retejo www.lernu.net, kiu ebligas lerni Esperanton pere de pli ol 30 lingvoj. (La kurso estis lanĉita dum la UK en 2016, la libro unuafoje aperis dum UK en 2018).

La libro estas plenilustrita, kun allogaj koloraj ilustraĵoj, kiuj ankaŭ akompanas la lernu-kurson. Temas pri scienc-fikcia rakonto pri la tempo-vojaĝo, por viziti Universalan Kongreson, rekonti sian amon kaj helpi al si mem iĝi Esperantisto.

Tre taŭga ankaŭ pro la facila lingvaĵo, ĝi certe povas allogi ne nur komencantojn — sed pro ties aventuremo kaj surprizaj turnoj ĝi ja estas atentokapta rakonto por iu ajn.

La verko haveblas en la Kongresa butiko, teretaĝe, apud la akceptejo kontraŭ 12 CAD.






**Hodiaŭ:** 24°, iom da pluvo

**Vespere:** 17°, sennuba

**Nokte:** 14°, sennuba



**Morgaŭ matene:** 20°, suna

# Aldonoj al la programo

**Horduono kun Brunŝtono**

Aŭtora duonhoro virtuale - kun Mikaelo Bronŝtejn: Mi provos kurte prezenti miajn librojn kiuj aperis en Rusio, Litovio kaj Polando en 2021-2022, kaj, memkompreneble diskuti, respondi al demandoj ktp.

*Salono Saint-Martin, 11:00-11:30*

**Aaron - Fingtam Languages**

Prelego pri romano kaj lernolibroj eldonitaj en Esperanto kaj Tokipono de Aaron de la Jutuba kanalo Fingtam languages:

Zombia Koramikino

La Eta Drako

Operation Language Stories: Microstories

El La ternesto

*Salono Saint-Martin, 17:00-17:30*

**Aŭtora duonhoro 3**

*Ĉirkaŭ la mondo 500 jarojn post Magelano,* Igor Galaychuk, Viktor Payuk

*Salono Saint-Martin,* 14:15-14:45

**Laborsesio de Esperanto-USA** pri la novaj kialoj por instigi homojn por membriĝi aŭ remembriĝi. Ĉiuj estas bonvenaj.

*Salono Hodler,* 12:15-13:00

# Anoncetoj

**Rendevua tabulo**
En la halo apud la informejo, estas rendevua tabulo. Bonvolu regule rigardi ĉu estas mesaĝo por vi. En sabato, ni forĵetos ĉiujn restantajn mesaĝojn.
\LKK

**Masko**
Ni denove forte rekomendas ke vi uzu maskon en la kongresejo. Bonvolu konsulti la paĝon 41 de la kongresa libro por pliaj informoj pri kovimo-19.
\LKK